

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penceoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 58

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 aprilo 1925

OUR FIFTH CONGRESS.

April 10—16.

The programme for the Congress is as follows:—

Friday evening—Unofficial visit to St. Kilda.

Saturday morning and afternoon—Business meetings in the Melbourne High School, Spring Street.

Saturday evening—Musical and dramatic recital at the Austral Salon, 231 Elizabeth Street.

Sunday afternoon—Visit to the Botanical Gardens.

Sunday evening—A special sermon will be preached by the Rev. Dr. Strong at the Australian Church, 19 Russell Street.

Monday—All day picnic to Eltham.

Tuesday morning and afternoon—Business meetings at the Melbourne High School, Spring Street.

Tuesday evening—Opening of the Congress. Prominent speakers will address the meeting. The public are invited.

Wednesday evening — Children's concert in Esperanto at the Melba Hall, University Grounds, Sydney Road.

Thursday evening — International Costume Ball, Ormond Hall, Moubray Street, off St. Kilda Road.

During the week there will be a Congress Business Meeting and also meetings of those interested in the

Australian Esperanto Association and the Universal Esperanto Association. Members who wish to bring matters for discussion before any of these meetings are requested to send their proposals to the secretary as soon as possible.

Visitors who wish the organisers to secure accommodation for them are asked to make prompt application.

Intending Congress members will relieve the anxiety of the organisers if they pay their subscriptions promptly. The fees are:—Country and Interstate members, 10/6; Melbourne members, 21/-.

Members who are unable to call personally at 212 Swanston Street, for their congress documents are requested to give the secretary ample notice so that they may be sent by post.

During the Congress the official address will be 212 Swanston Street.

R. R. RAWSON, Hon. Secretary.

H. BYATT, Hon. Treasurer.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Aŭstria Esperantisto, n-o 1; British Esperantist, n-o 238; Heraldo de Esperanto, n-oj 6, 7; International Language, n-o 1; La Unuigita Tut-homaro, januaro; La Suno Hispana, 92; La Interligilo de L.P.T.T., n-o 3; Literatura Mondo, n-o 10; Pola Esperantisto, n-o 11-12.

MILESTONES IN 1924.

As the end of the year is a time for taking account of stock and for reckoning up profits and losses, it may be well to count up some of the gains of the Esperanto movement,—not as an excuse for ceasing our labors, but as an incitement to further effort. Here are some of the significant gains of the past year:

1. In 1922 some zealous police officers arrested a number of Esperantists in Cluj, Rumania, as suspicious persons, because of the strange language they spoke and the strange symbol they bore—a green star. It was long before the case came to trial but when it did, on January 28, of this year, Col. Tucas, president of the Military tribunal, rebuked the police for their misdirected zeal, and declared that far from its being a matter of suspicion, the study of Esperanto was meritorious, and he regretted that he had not the time to take it up. Furthermore, Sro. Mosto Romulus P. Voinescu, General Director of Public Order and Safety, of Rumania, hearing of this police blunder, introduced Esperanto as a compulsory study into the school for Rumanian police—the only language they are now obliged to learn!

2. Last spring the Prussian government, having learned that a very large number of school teachers were qualified to teach Esperanto, authorized its introduction into all schools where a sufficient number of pupils desired to learn, and urged the teachers to make known to parents the advantages of the study.

3. The Italian government introduced Esperanto as an elective study into the Royal Naval Institute, the Royal School of Technology, the National College and the Royal School of Commerce at Bari. This important gain is largely due to Prof. Localendola, the U. E. A. delegate at Bari.

4. It is unnecessary to do more than mention the group of Congresses held last summer, in Europe, in which Esperanto was the only language used; among them were the Bulgarian Congress, July 27-29; the French Congress at Strassburg, Aug. 2-4; the Rumanian Congress in Arad Aug. 2-5; the Polish, in Warsaw, and the Great World Congress at Vienna, attended by 3400 Esperantists from

more than 40 countries at which Dr. Privat announced that the Esperantists would soon have their own Radio broadcasting station at Geneva, one half the cost having been subscribed by one man, and the raising of the remainder being the task of the Esperantists of the world.

5. In August the American Radio Relay League, the largest in the world, decided in favor of Esperanto as its vehicle for international communication.

6. "Radio News," with nearly half a million circulation, decided to recommend Esperanto to its readers.

7. The League of Nations Assembly, without a dissenting vote, recommended to League member states that they give to Esperanto, when used in telegraphic or telephonic communication, the same treatment and tariff as to national languages. At the same time the League refused to include other "artificial languages" in the recommendation.

8. The daily papers have recently informed us that the Hungarian Minister of Education has directed that Hungarian children be taught Esperanto twice a week, the Esperanto Clubs of Hungary having volunteered to furnish the teachers.

Nor should we forget to mention the subvention which the Finnish government has for the fourth year given to Esperanto in Finland; nor, in our own land, the courses offered by Columbia University, and Antioch College; nor the admission last summer of a student into the University of California with credit for Esperanto studied at the Montezuma School for boys in that state.

Better progress than this could hardly have been made, and many of these gains came after an initial rebuff, as was notably the case of Rumania.

There is an old story of two weary travellers who on passing two milestones bearing the same figure exclaimed cheerfully:

"Well, anyway, we're holding our own."

The Esperantists have done much better than this, and in recent months have been passing milestones so rapidly that it seems worth while to mention these to encourage some who have perhaps not kept account of the march of events.—H.B.H.

—El Amerika Esperantisto.

NOTES AND NEWS.

An American Friend asks "Is utter ignorance or indifference regarding an agency of such potential utility as Esperanto a thing for a live man to be proud of?" What is your attitude?

Radio Support for Esperanto.—Following on the growth of long-distance communications in amateur wireless, it was agreed at a recent meeting of the Victoria division of the Wireless Institute of Australia to adopt Esperanto as a medium of carrying out communications with foreign countries. A similar step was taken not long ago by the American Radio Relay League, as difficulty was frequently experienced by radio amateurs in the United States in communicating from their experimental stations with amateurs in European and some South American countries.

Esperanto at the West Indies.—We were interested to note in a recent number of the "Port of Spain Gazette" an article on Esperanto. This article, which was well written, shows how widespread is the interest taken in the International Language.

Post Office Workers and Esperanto.—The organ of the Union of Post Office Workers, "The Post," for January 3rd, contains the introduction to a series of short lessons on Esperanto. We extract the following from the Editorial comments:—"Esperanto is coming more and more into use, and for all practical purposes the competing claims made by it and other international languages have been settled in its favour by the number of its adherents. We commend the series of lessons to our readers' attention. Although easier to learn than any single foreign language, it is a much more valuable enfranchising medium." We congratulate "The Post" on its enterprise.

"Musicians' Journal," Jan., prints a letter in Esperanto and English by Mr. R. Coppock, of the National Federation of Building Trades Operatives.

Philately. Radio de Filintern (Oficiala organo de Filatelista Internacio, 1 Tverskaja-Kamskaja 3, Moskvo), for Oct.-Nov., contains articles of interest and importance in five languages including Esperanto.

Radio. The Fourth Bulteno de la Internacia Radio-Asocio appears in printed form, and is excellent reading.

The January number of "Experimental Wireless" (1/-, at all book-stalls) contains an English-Esperanto Wireless Dictionary, with an Esperanto conversation between two transmitters.

HERE AND THERE.

An interesting experiment is being carried on in several countries simultaneously. Business men in each country, after 25 hours' instruction, will be put in touch with students in other countries who have taken a similar course. Results will be noted as to the proficiency attained, and the suitability of Esperanto for commerce.

In London the experiment is under the control of the French Chamber of Commerce. Prizes are offered to the best students. All engaged in any branch of commerce are eligible, provided they have had no previous instruction. Eighteen have already joined.

The Women's Co-operative Guild issue the English and Esperanto words of La Patrino Internaciano (Prize Song by Mrs. L. Woodward) at 1d. It will be printed later with music.

At the B.E.A. Stall at the Conference of Educational Associations was a good display of literature. There was a fair attendance, but London Esperantists generally did not rise to the occasion.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Antaŭ kelkaj semajnoj, Lordo Stradbroke, la gubernatoro de la ŝtato de Viktorio, faris paroladon ĉe la preĝejo "Wesley," pri la longa vojaĝo, kiun li kaj lia edzino faris per aŭtomobiloj tra la centro de Aŭstralio, de Suda Aŭstralio ĝis la Norda Teritorio. Nun mi tradukos el la raporto aperinta en la tagjurnalo, kaj lasos lia moŝto mem paroli.

— Paroli pri la tuta vojaĝo, mi povas diri, ke la lokoj, kiujn ni vizitis, estas similaj al la aliaj partoj de Aŭstralio, kie oni trovas distriktojn fruktdonajn,, iom fruktdonajn, kaj preskaŭ senutilajn.

— Ni vojaĝis laŭlonge de la brutvojo, dum la plej pluvmanka jaro spertita dum multaj jaroj, kaj nature vidis la landon, kiam ĝi malplibone aspektis; kaj por la okaza vizitanto, tiu estas la plej bona tempo por juĝi la landon, tio estas laŭ la sankondiĉoj de la brutoj, kaj surprizis min, ke la brutoj tiel bone aspektis post tia longdaŭra pluvmanka periodo.

— La kialo por la vojaĝo, krom la espero, ke ni multe ĝuos ĝin, estas, ke la popolo sciu, kiel facile estas fari la vojaĝon, kaj ke la Aŭstralianoj sciu sian landon, ĝiajn bezonojn, kaj la eblecojn de ĝia evoluo, kaj mi esperas, ke la fakto, ke mi vojaĝis 3300 mejlojn per aŭtomobilo, tra tiuj distriktoj, sen ia ĝenaĵo, pruvos ke iu ajn povos fari la vojaĝon, kiu povas dormi sub la ĉiela bluo, kaj povas kuiri al si la nutraĵon.

— La distancoj inter la lokoj, kie akvo estas trovebla, sude de fontoj "Alice" estas tre longaj, ofte 100 mejlojn. Feliĉe por mi la difekto al mia aŭtomobilo okazis, kiam mi estis nur kvin mejlojn malproksime de domo; se la difekto okazis, kiam mi estis 50 mejlojn for de la akvo, mi estus devigita fari penegan marŝadon tra sabla lando, kaj porti la necesan akvon kaj nutraĵon. Kiel okazis la afero nur finis ridinde, kaj lia moŝto la gubernatoro alvenis ĉe "Crown Point" en sia aŭtomobilo, tiritita de du azenoj, kaj li daŭrigis la vojaĝon la sekvan tagon per pruntita kaleŝo al "Horseshoe Bend," de kie li povis telegrafi raporton pri la du tagoj dum kiu li estis raportita, kiel perdita en la dezerto!

— La unua parto de nia vojaĝo estis trans nebona distrikto, kvankam

oni informis nin, ke proksime la lando estas fruktdona, kaj ke tie sin paŝtas ŝafoj. La granda bezono ĉie estas la akvo, multfoje ni estis informita, ke tuta manko de herbo estas nekonata en tiu ĉi distrikto, sed mankas sufiĉe da akvo por la ŝafoj, tiel la lando povas porti nur malmultajn brutoj, sed kiam la akvo-provizo estos pliboniĝinta kaj la fervojoj atingos tiun ĉi landon multaj ŝafbredejoj establiĝos, kvankam certe estos necese starigi barilojn, por protekti la ŝafojn kontraŭ la "dingoes" (indigenaj hundoj) kiuj estas multnombraj ĉe kelkaj lokoj de la Norda Teritorio.

— Nuntempe troviĝas nur tre malmultaj bariloj inter "Oodnadatta" kaj "Darwin," distanco de pli ol 1100 mejlojn. Ĉirkaŭ fontoj "Alice" troviĝas lando kiu donas multe da nutraĵo por ŝafoj, kaj se oni povas provizi en digoj sufiĉe da akvo dum la pluvmanka tempo, la lando povas nutri la ŝafojn dum la tuta jaro. Ankaŭ en kelkaj lokoj troviĝas akvo de 60 ĝis 500 futojn sub la surfaco, kaj plimalproksime ĉe la landlimoj de Kvinslando, arteza akvo troviĝas je profundo de 4000 futojn, el kelkaj de kiuj mi vidis la elŝprucantan akvon, kaj ĉe unu el tiuj la akvo preskaŭ bolas, ĉe alia 5000 futojn profundan la akvo efektive bolas, kiam ĝi atingas la surfacon.

— Proksime al "Camooweal" troviĝas subtera kaverna en kiu troviĝas granda lago, kaj oni supozas, ke tiu ĉi lago etendiĝas sub la tuta distrikto, kaj ke estas el tiu provizejo, ke oni havigas la akvon pere de la artezaj putoj.

— Ni rimarkis, ke kie ajn ni iris, kie la akvo estas havebla, ke oni povas kreskigi kion ajn en la ĝardenoj, kaj tiel bongustajn tomatojn mi neniam antaŭe manĝis. Oranĝoj kaj vinberoj kreskas ja bone ĉe fontoj "Alice." La klimato dum la vintro estas tre bona, sunaj tagoj, kaj malvarmetaj noktoj, kaj okaze frostas.

— Ĉe tre interesa valo en la montaro "Macdonnell" nomita Palmvalo, troviĝas palmo, kiu ne estas trovebla en ia alia loko de la mondo, kaj oni supozas, ke ĝi estas la lasta el la prahistoria vegetaĵo, kiu jam de longe forpasis el aliaj lokoj.

— La gastemeco de la popolo tra la tuta Norda Teritorio estas tre laŭdinda, al la vizitantoj ili estas tre

afablaj. Kiam estas raportata, ke iu perdiĝis, ili tuj organizas partiojn por elserĉi la perdaton, ĉar ili bone scias, ke se iu estas perdita dum du tagoj, pro manko da akvo, kaj en la sumero pro la varmegeco, ke estas preskaŭ certa ke tiu mortos.

— La solaj tomboj laŭlonge la vojo atestas al katastrofoj. Eble la plej bedaŭrinda okazis ĉe "Horseshoe Bend," kie pereis homo; kiu, se li povis marŝi nur pluan cent jardojn al la supro de la monteto, tiam li vidus la bienhejmon, kaj sendube post penego atingus ĝin.

— La ŝargveturistoj estas fidindaj, kaj ili scias, ke la homoj ĉe la brutbredejoj, kaj la homoj kiu prizorgas la telegraflinion dependas je ili por la alporto de necesajj precipe nutraĵoj. Tiujn ĉi necesajojn kutime oni ricevas nur unu foje ĉiu jare, kaj pro tio se la ŝargveturistoj ne alvenas akurate, la homoj multaj suferas.

— Ĉe la Norda Teritorio troviĝas multaj mineraloj, sed pro la alta kosto de la transporto oni ne povas prilabori ilin, ĉe multaj de la brutbredejoj la kosto por alporti unu tunon de komercaĵoj valoras 30 fundojn sterlingajn, tiu donos ideon pri la grandaj distancoj la ŝargveturistoj listoj devas veturi; li ofte bezonas tri monatojn por liveri ŝargon, kaj reveni al la hejmo.

— Pri la estonteco de tiu ĉi vasta teritorio, estas facile kredi ke dum ankoraŭ restas lando proksime al la fervojoj, kiun oni povas aĉeti malkare, la malproksimaj partoj nur povas esti prilaborataj de kompanioj kiuj povas prilabori farmojn de milionoj da akreoj, kaj kiuj povas elspezi la monon por elbori artezajn putojn, por havigi konstantan provizion da akvo. Po unu arteza putoj estas necese por ĉiu aro de 1500 brutoj, ne ĉar la putoj ne liveros pli ol sufiĉe da akvo, sed se pligranda aro da brutoj trinkas ĉe unu putoj, ili formangas la nutraĵojn por tiel granda distanco ĉirkaŭe, ke la brutoj devas marŝi tre longaj distancoj sen nutraĵoj, kiam ili volas trinki, kaj pro tio maldikiĝas.

— Por prui la entreprenemon de kelkaj el la kompanioj, la administranto de unu el la brutbredejoj informis min, ke ĉe la brutbredejo, kiun li prilaboras, ke jam estas elboritaj 23 putoj, 6 el kiuj estas artezaj, kaj la ceteraj subarteza, ku-

time estas nuntempe, kiam oni elboras puton, ke apude oni konstruas digon, por konservi dusemajnan provizion da akvo, kaj tiu antaŭzorgo lasas sufiĉe da tempo ripari la pumpilon se ia difekto okazos, la 10000 galona cisterno antaŭe uzata ne provizis sufiĉe da akvo. La elvaporigo kaŭzita de la varma suno, kaj ankaŭ de la varmaj ventoj estas tre granda.

— Unu el la gravaj malhelpaĵoj en tiu ĉi distrikto estas ke, nek troviĝas doktoro inter "Oodnadatta" kaj "Darwin," distanco de 1100 mejlojn, nek hospitalo pli proksime ol "Mar-anboy," distanco de 800 mejlojn, sed estas kontentige scii, ke la enlanda misio esperas baldaŭ starigi hospitalon ĉe fontoj "Alice."

— La homojn, kiujn mi renkontis, estas tre bona tipo, ĉiuj bone fartas kaj estas ĉiam pretaj helpi la najbaron, kaj ĉiu volas finfari la laboron ili akceptis fakte ili havas la veran spiriton de la pioniro, kiu sentas, ke la estonteco de la Norda Teritorio dependas je ili.

Salutas vin P. H.

GRAMOPHONE RECORDS IN ESPERANTO.

Sir,—At the instigation of Dr. Privat the well-known firm of Pathe Freres have consented to produce a series of gramophone records of speeches lessons and stories, wholly in Esperanto. The first series will consist of six records. The Melbourne Esperanto Society is importing a supply of these and will be glad to receive orders from anyone desiring to have this admirable means of hearing the international language spoken by proficient and able esperantists. The price in Australia is not yet definitely fixed, but it is expected to be about 25/- for the series of six. Teachers, students and others who wish to acquire this series of records should send their order as early as possibly direct to the hon. librarian, Melbourne Esperanto Society, Box 731F, P.O. Elizabeth Street, Melbourne.

Correspondents will be notified when the records arrive from Europe.

H. BYATT, Librarian.

SIMIOĈASADO EN LONDON.

Kiel la "reĝo de la tegmentoj" estas superruzita.

La longkolonaj raportoj de la anglaj pri la antaŭnelongaj elektoj estis interrompataj en maniero, kiu evidente ĝojigis la legantojn. Inter la diskutadoj pri la ĉaso je elektistoj oni trovis subite la priskribon de ĉaso je simio.

La simio, propaĵo de enloĝanto de la kvartalo Camberwell, estis sukcesinta havigi al si la liberecon, kvankam ne la liberecon de la afrika, praarbaroj, sed tiun sur la tegmentoj de la londonaj domoj. Tie ja ne troviĝas kokosoj sed anstataŭe tre multe da fulgo. La lerteco de "Joey"—tiel nomiĝis la simio—promeni malrapide sur la tegmentoj, plej rapide kuri kaj fari la plej burleskajn saltojn, alportis al ĝi en unu el la londonaj ĵurnaloj la alnomon "reĝo de la tegmentoj." La lerta praabara burĝo sciis dum du semajnoj elfugi al ĉiuj ĝiaj persekutantoj, kion ajn ili elpensis por kapti ĝin.

Komence Joey elektis al si kiel noktloĝejon la brunsvigan parkon kaj leviĝis ĉiam tre frue por enrompi kaj ŝteli. Ĝia specialaĵo estis malfermitaj fenestroj. Kiam ĝi ekvidis tian, ĝi rampis laŭlonge de la tegmenta pluvodefluilo, atente rigardis kun kruela rikano en la koncernan ejon kaj forkurigis per tio la enestantojn.

Poste ĝi ensaltis, ekprenis kion ajn, kio ŝajnis al ĝi manĝebla kaj forfugis.

Foje iam kolektiĝis granda popolamaso, kiu aranĝis sovaĝan ĉasadon super la tegmentoj, por ekhavi ĝin, sed ĝi ankoraŭ feliĉe sin savis. Alifoje oni vidis ĝin sidanta sur arbo: evidente tre malĝoja pro la malbona vetero, sed ĝi kontraŭstaris al la rezigno de sia libereco.

Poste oni kredis havi ĝin fine. Virino havis la ideon, fermigli la fenestron, post kiam Joey estis ensaltinta; poste ŝi ŝlisis la pordon kaj kuris al la polico por arestigi la enrompinton. Sed Joey interdume ekprenis pecon da sapo kaj komencis manĝi ĝin. Ĉar la sapo evidente ne bongustis al ĝi, indigne ĝi forĵetis ĝin tra la fenestro, detruis vitran platon kaj sekvis la sapon tuj poste. Kiam oni venis, la nesto estis malplena.

Generale ĝi preferis ĉe siaj enrompoj legombutikojn, el kiuj ĝi ŝtelis bananojn, pomojn, vinberujojn ktp. La polico en sia malespero venigis fakulon el la zoologia ĝardeno, sed ankaŭ ĉi tiu ne povis kapti la kvarpiedan krimulon.

Unu vesperon oni starigis sur tegmento, kiun ĝi kutimis honori per sia vizito, grandegan musokaptilon, en kiu du freŝaj krudaj ovoj kuŝis kiel loĝejo. Je la proksima mateno la kaptilo staris same malplena kiel la antaŭan vesperon, eĉ ankoraŭ pli malplena, ĉar la ovoj estis malaperintaj kaj ankaŭ nature Joey.

Dum la tago ĝi ree aperis, tute malseka kaj spite de ĝia alta pozicio tre malbonhumora. Sed baldaŭ ĝi reakiris sian gajecon, kiam sur la strato amasiĝis granda popolamaso kiu observis ĝiajn kapriolojn kun entuziasmaj aklamoj. —

Eĉ la polico intervenis. Joey nome iutage estis elektinta al si la preĝejoturon de Benhillroad kiel lokon, de kiu ĝi povis rigardi London kaj sur kiu ĝi montris siajn artaĵojn. La polico sendis du policianojn sur la turon por kuratako kun la mandato, aresti la forkurinton; sed ili estis devigataj al malglora returniro, kion salutis la stratobubaro per ĝojkriegoj. La du policianoj rampis, dikajn ledogantojn sur la manoj, kaj provizitaj per granda sako, sur la turon kaj eliris proksime de la pinto. Kun granda intereso atendis Joey ilian alvenon; sed kiam ili volis ĵeti la sakon super ĝin, ĝi forsaltis kun miriga facilmoveco.

Ĉiuspecaj aliaj iloj estis elpensataj aŭ rekomendataj, por kapti la simion: uzo de lazo, bananoj, kiuj antaŭe estis metotaj en narkotigan medion, rostitaj terpomoj varmegaj, kiujn oni ŝprucu per kloroformo, nukso kun hoko, je kiu pendus longa ŝnuro, reto, kiun oni ĵetu super ĝin dum ĝi dormus, ktp.

Iu havis la ideon, ke oni invitu lack Jarvis la ratokaptiliston de la londona graflanda konsilantaro, por la simio-kaptado, ĉar li estus la unika, kiu povus ekhavi la simion, supozite, ke Jarvis ankoraŭ estus tiel vigla kiel iam. Sed ĉi tiun dubon la ratokaptilisto ne volis lasi sidanta sur si. Li ekmarŝis al la simioĉaso kaj fakte sukcesis, surprizi la simion. Kiamaniere Jarvis aranĝis tion? Li instalas sur la tegmento de preĝejo, sur kiu Joey kelkfoje aperis, kaptilon per

fojno maskitan. La fojno estis ŝprucita per orienta narkotilo. Kiel logaĵo servis ree krudaj ovoĵoj. Joey fakte iris en la kaptilon, post kiam ĝi estis evitinta plurajn provojn kapti ĝin per lazo, kiel ankaŭ la narkotadon per kloroformo ĵetita kontraŭ ĝi per ŝprucilo.

Jarvis estis gratulata de ĉiuj flankoj. Li rakontis, ke li sciigis pri la mistero de la narkotilo, superinta la simion, de orientulo. Leonoj, tigroj kaj aliaj sovaĝaj bestoj estas tuj venkataj de ĉi tiu ilo, Joey, kiu estas nur simio, do ne bezonas honti, ke ĝi estas kaptita tiamaniere.

(Laŭ "Neues Wiener Journal," trad. H. Fahl, Wien.)

—El Esperanto Triumfonta.

GRAVA PROBLEMO.

Tion-ĉi rakontis al mi vojaĝadinta amiko. Mi lasas lin paroli, pro la okazo se tio ne estus tute vera.

—Revenante Francujen post longa ĉirkaŭo, mi haltis kelkajn tagojn en rusa urbeto. Baldaŭ mi tie ekkonis du popojn kiujn por vi mi nomos Petro kaj Nikolao. Kiel ĉiu rusa popo sin observanta, ili ambaŭ posedis barbon belan kvankam ne ĉiam tre puran sed Petro estis precipe favorita de Naturo, ĉar lia ornamilo mal-supreniris ĝis genuoj.

Iam Nikolao, rigardante sian kolegon, al li demandis:—Diru, Petro, kien ci metas cian barbon, kuŝigante? Miregigite, Petro sin turnas al la alia, kiu daŭrigas:—Diru, ĉu ci metas cian barbon sur la kovrilon aŭ sub la kovrilon? —Nu! respondas Petro, mi ĝin metas.. ĝin m.. et.. as... Li serĉas dum momento, kaj fine diras: — Vere mi ne scias; sed vespere mi atentos, kaj al ci morgaŭ mi donos respondon.

Reenirinte hejmen, Petro memoras la demandon de Nikolao. Li kuŝigas kaj konstatas, ke lia barbo estas sub la kovrilo. Iom pripensinte, li diras

al si: — Ne tie ĝi estis kutime. Li do eltiras la hararon al aero, sed tuj ŝajnas al li, ke neniam ĝi tiel estis. Li ĝin rekovras kaj ankoraŭ kredas, ke ĝi ne troviĝas en ordinara loko. Dum noktoparto, la embarasanta barbon li vice eltiras kaj kaŝas konsciece sed ne sukcese, ĝis fine li ekdormiĝas.

La morgaŭan matenon, mi renkontis la du popojn. Petro ne estis povinta informi sian kunulon; sed li estis promesinta, ke li rekomencos la eksperimenton.

Ve! mi foriris, ne eksciinte la solvon de tiu grava problemo, kaj eble Petro ĝin ankoraŭ serĉas.

A. ROUMANET.

—El Le Monde Esperanciste.

IT ISN'T EASY.

To apologise.
To take advice.
To be unselfish.
To be charitable.
To be considerate.
To endure success.
To admit mistakes.
To obey conscience.
To control one's self.
To forgive and forget.
To think and then act.
To be content with little.
To say "no" to temptation.
To accept just rebukes gracefully.
To value character above reputation.
To discriminate between sham and real.

—But it pays!

NE ESTAS FACILE.

Peti pardonon.
Akcepti konsilon.
Esti sindonema.
Esti amema (indulgema).
Esti konsiderema (havi konsideracon).
Elporti sukceson.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEW.

Konfesi erarojn.

Obei al la konscienco.

Sin regadi.

Pardonu kaj forgesi.

Unue pensi kaj poste agi.

Esti kontenta havante malmulton.

Dire "ne" al tentado.

Akcepti meritajn riproĉojn danke (afable).

Taksi karakteron pli alte, ol reputacion.

Distingi la falsan de la reala.

Sed tio rekompencas!

Tradukis S. Trewin.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenaj sumoj estas ricevataj de la kongresa sekretario:—N-o 85, S-ro Predl, 21/-; n-o 86, F-ino I. Thomas, 21/-; n-o 87, S-ino Bartram, 21/-; n-o 88, F-ino L. Iriwin, 10/6; n-o 89, F-ino Aston, 21/-; n-o 90, S-ro Hepworth, 21/-; n-o 91, F-ino Salter, 21/-; n-o 92, S-ro R. Watkins, 21/-; n-o 93, S-ro Serpell, 21/-; n-o 94, F-ino Rawlinson, 21/-; n-o 95, F-ino Cruickshank, 21/-; n-o 96, S-ro M. Hyde, 21/-; Donacoj:—F-ino L. O'Connor, 2/6; Walking Club, 8/8.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 23 marto ni ricevis la jenajn sumojn:—O. Behnken, 1/-; H. Byatt, 2/9; J. Parker, 4/6, novembro '25; C. W. Ballard, 4/6, decembro '25;

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Gaste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso,

Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretario S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo, "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie; sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.